



marto 1965



NEDERLANDA ESPERANTISTO

*Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
"La Estonto Estas Nia"*

30-a jaro ; n-ro 3-a. Administranto : P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. Jara abono por ne-membroj: gld. 4,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro : H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel. : 0 83 00 - 2 66 99.

JARO DE INTERNACIA KUNLABORO JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO.

En la organo „ESPERANTO” de UEA, de decembro 1964 sur paĝo 205, troviĝas artikolo sub la titolo: „Lastaj progresoj de la subskribokolektado”. Sub tiu artikolo estas represita la Esperanta deklaro de la dana Eksĉefministro Viggo Kampmann. Tiu deklaro havas grandan valoron ankaŭ por ni, nederlandaj esperantistoj, precipe por montri ĝin ĉe la varbado de subskriboj por la propono. Por tiu celo la deklaro tamen devas esti en la nederlanda lingvo. Tial ni sekvigas ĉi-sube tiun nederlandlingvan tekston:

VOORSTEL

AAN DE VERENIGDE NATIES BETREFFENDE ESPERANTO

ter gelegenheid van het Jaar van
Internationale Samenwerking.

De internationale samenwerking is van groot aktueel belang en heeft een absoluut beslissende betekenis. Daarom verdient ieder initiatief, ieder streven en iedere aktie, met doel die samenwerking uit te breiden, de grootste sympathie en belangstelling.

Voorwaarde voor een geheel vrije en onbelemmerde samenwerking in internationaal verband is echter, behalve de oplossing van andere vraagstukken, de oplossing van het internationale talenpro-

bleem. In nationaal verband kunnen de nationale talen worden gebruikt, maar voor de toepassing in internationale betrekkingen is de verwezenlijking van een internationale taal noodzakelijk.

Er kan geen twijfel over bestaan, dat een internationale taal de mogelijkheden van samenwerking sterk zal uitbreiden en dat een belangrijke vooruitgang op het gebied van de techniek en wetenschap, van humanistische activiteiten en internationale kultuur er het gevolg van zal zijn.

Naar zijn aard en inhoud is dit voorstel waard, gesteund te worden door alle politieke richtingen, konfessionele en andere groeperingen in de maatschappij. Geïnteresseerde kringen in de verschillende landen kunnen de behandeling ervan voorstellen aan de V.N. en de UNESCO en op basis daarvan hebben die organisaties de taak, het initiatief te nemen tot het kiezen en doorvoeren van de officiële internationale taal van de wereld.

Er wordt zeer veel gedaan om aan de Internationale Taal Esperanto die officiële positie te verschaffen. De resultaten daarvan zijn grote ervaringen en een uitgebreide dokumentatie betreffende de kwaliteiten van de taal. Op grond daarvan ontstond tien jaar geleden regelmatige samenwerking tussen UNESCO en de Universala Esperanto-Asocio (Esperanto-Wereldbond).

Op diezelfde gronden kan ik de ondersteuning van het voorstel aan de V.N. met kracht aanbevelen, opdat:

ASOCIAJ INFORMOJ.

Peto de la kasistino al la ĝeneralaj membroj.

Ni petas la ĝeneralajn membrojn kaj abonantojn pagi antaŭ la 1-a de aprilo 1965-a la kotizon resp. abonon.

Ĝeneralaj membroj gld. 8,50
Samhejmanoj „ 3,—
Abono „Nederlanda Esperantisto” „ 4,50

Propagando.

Ekzistas ankoraŭ stoko da niaj propagandfaldfolioj „Kent u de heer Stephan Didakos uit Saloniki?”. Uzu ilin grand-skale kaj petu alsendon ĉe s-ro J. R. Janssen, Rijperweg 12, Bloemendaal.

La subskribo-kolektado.

Ĝis la 20-a de januaro la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam ricevis entute 1239 subskribofoliojn kun 25392 individuaj subskriboj el 33 landoj, kaj subskribojn de la oficuloj de 138 organizaĵoj en 18 landoj kun entute 1 155 509 membroj. Ni ĉiuj faru nian

„de Verenigde Naties het internationale talenprobleem zullen oplossen door daadwerkelijke en doeltreffende medewerking aan de verbreiding van de neutrale Internationale Taal Esperanto, o.a. door de Staten-Leden aan te bevelen het onderwijs van deze taal te bevorderen, het gebruik ervan in de internationale betrekkingen tussen de volkeren te stimuleren”.

Kopenhagen, 19-10-1964.
Viggo Kampmann,
Oud-Ministerpresident
van Denemarken.

Ĉiu varbu fervore subskribojn por la propono, kiu ankaŭ estas VIA propono. Ni bone konsciu, ke ĉi tiu subskribo-kolektado superas en graveco tre multe tiun de antaŭ iom pli ol 10 jaroj por la Peticio al Unesko. Ĉe la varbado la suprestaranta deklaro certe povos bone servi. Pri la subskribo-kolektado mem ni povas sciigi, ke ĝi **sufiĉe** kontentige progresas. Tio estas ĝojiga, sed tiu vorteto „sufiĉe” devas esti plejeble baldaŭ superflua!

J. Th. de Goeij.

eblon por sukcesigi ĉi tiun kampanjon! Oni legu la artikolon: „Jaro de internacia kunlaboro, jaro de la internacia lingvo Esperanto” en ĉi tiu numero de „N.E.”. Novajn subskribo-foliojn oni povas peti ĉe nia sekretariino.

Glumarko „Jaro de Internacia Kunlaboro”.

Okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro 1965 la Universala Esperanto-Asocio eldonis specialan glumarkon. La glumarkoj estas aĉeteblaj ĉe la Centra Oficejo de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2 (poŝtĉekkonto: 37 89 64), je la prezo de gld. 0,40 (1,6 steloj aŭ 1 rpk.) por ĉiu folio de 10 markoj.

Reprezentado dum la 2-a Internacia Konferenco de lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata.

La supre nomita konferenco okazos inter la 13-a kaj la 20-a de aŭgusto 1965-a en Anglujo (Porinstruista Kolegio, Hockerill College, Bishops Stortford, Herts.). Same kiel en la 1-a Konferenco (1963 en Beograd) la organizantoj atendas delegaciojn el ĉiuj landoj, en kiuj Esperanto estas instruata en la lernejoj. Ĉar estas grave, ke ankaŭ nia lando estos reprezentita, la estraro petas tiujn personojn, kiuj pretas viziti la konferencon, anonci sin kiel eble plej baldaŭ ĉe la sekretariino.

MABESOONE-FONDAĴO.

Envenintaĵoj en la jaro 1964.

8/ 1	J.P.H. en H.	gld.	5,—
15/ 1	D.K. en Gr.	„	2,50
19/ 2	F.B. en R.	„	2,50
26/ 2	D-ro W.A.V. van T. en A.	„	15,—
24/ 3	Sekcio Den Helder	„	15,—
5/10	Sekcio Haarlem	„	63,20
27/10	Sekcio Groningen	„	45,50
17/12	Merkurio, Rotterdam	„	14,—
21/12	A.H. v. D. en H.	„	5,—
23/12	J.E.P. en G.	„	2,50

Entute gld. 170,20

Al ĉiuj gedonacintoj koran dankon.

F-ino J. E. Prins,
Hora Siccamingel 294,
Groningen.
Ĝirkonto: 81 58 89.

EKZAMENOJ.

Esperanto-Ekzamenoj por E., M. kaj S.

La ekzamenoj por E., M. kaj S. okazos ĉi tiun jaron en la „Rijks-H.B.S.” en Amersfoort, je la 5-a de junio 1965-a. Vidu la aliĝilon en ĉi tiu numero sur la lasta paĝo.

Esperanto-Ekzamenoj por la „L.O.-akte”.

De la Fondajo „Esperanto ĉe la Instruado” ni ricevis la sekvantan sciigon:

Hun, die in 1965 aan het examen ter verkrijging van de akte van bekwaamheid voor het geven van lager onderwijs in het vak Esperanto wensden deel te nemen, wordt dringend verzocht zich met ons secretariaat in verbinding te willen stellen.

Een briefkaart, waarop vermeld uw naam, adres, geboortedatum en de door u gevolgde opleiding met betrekking tot dit examen, is voldoende.

Wij zullen u dan tijdig op de hoogte stellen, waar en wanneer het examen zal plaatsvinden en waar en hoe u zich hiervoor kunt aanmelden.

Deze oproep geldt uiteraard niet voor de deelnemers aan onze schriftelijke cursus; zij ontvangen de noodzakelijke inlichtingen automatisch.

U gelieve uw briefkaart te zenden aan: Stichting „Esperanto bij het Onderwijs”, Hengelolaan 1027, 's-Gravenhage-14.

A. M. D. KORFF,
secretaris.

Pliaj informoj pri la ekzameno haveblaj ĉe supre nomita adreso.

EL LA SEKCIOJ.

Ĝojigaj Novajoj.

Post la laŭdinda ekzemplo de Sekcio Krommenie („N.E.” jan. 1965) Hago nun povas informi vin, ke en la Montessori-lernejo ĉe Guntersteinweg, Hago, s-ino Carli (LEEN) komencas instrui Esperanton al 28 infanoj de la 3-a, 4-a kaj 5-a klasoj de la Elementa lernejo! Ŝi sukcesis tiel entuziasmigi la infanojn, ke la gepatroj konsentis pri tiu instruado ekster la horaro.

Ankaŭ la interesita lerneja estraro volontis donis sian aprobon kaj unu membro eĉ demandis, ĉu li mem povos ĉeesti la lecionojn por kunlerni.

Komprenoble li ricevis permeson. Vere imitinda ekzemplo por ĉiuj geinstruistoj!

Al s-ino Carli kaj ŝiaj gelernantoj ni deziras multan sukceson!

Dum la jarkunveno de la Haga Sekcio de L.E.E.N., okazinta la 20-an de januaro, s-ro A. Bloemhard komunikis, ke li komencas instrui Esperanton al du grupoj de 22 kaj 18 gelernantoj de la „ULO”-lernejo Aucubastraat, Hago.

Kun la 28 gelernantoj de s-ino Carli en la Elementa Montessori-lernejo estas do nun en Hago jam 68 infanoj, kiuj lernas Esperanton kiel ne-devigan lernejan fakon. Komprenoble la jarkunveno tondre aplaudis por la du fervoraj geinstruistoj, kiuj dum la hieraŭa klubvespero ĝoje rakontis, ke ankaŭ kelkaj gepatroj jam estas „infektitaj”.

Geinstruistoj, ĉie en la lando, vi vidas, ke la „Mamut-leĝo” ne nur ebligas la nedevigan instruadon de Esperanto, sed ke per viaj volo kaj peno tio estas ankaŭ realigebla!

Do baldaŭ plenigu la kolonojn de nia gazeto per viaj „ĝojigaj novajoj”, por ke tio fariĝu daŭra rubriko!

E. O.

Sekcio Groningen.

Sekr.: Joh. de Wittstraat 103.

Je la 10-a de februaro nia plej maljuna kaj malnova ano s-ro J. V. Holleman iĝis 85-jara. Li ankoraŭ ĉiam regule partoprenas la kunvenojn.

Ĝis en tre alta aĝo s-ro Holleman multe laboris kaj verkis por la Esperantomovado. Antaŭ ne longe li decidis lasi la poresperantan laboron al la pli junaj gesamklubanoj. Tamen liajn konsiderindajn kaj saĝajn konsilojn rilate al multaj problemoj ni tre ŝatas kaj volonte akceptas de li. Ĉiam gaja, bonhumora li estas bona ekzemplo por nia tuta klubano.

Kara, estimata s-ro Holleman, nome de la tuta klubo mi elkore gratulas vin pro via naskiĝdatreveno kaj deziras, ke

CIU VARBU NOVAN ANON EN 1965

vi ankoraŭ longe restu en la mezo de viaj familianoj kaj ni.

N. C. Kuiterman-van Goor.

FRIESO MOLENAAR †

La 23-an de januaro mortis en la aĝo de 83 jaroj Frieso Molenaar, muzikpedagoĝo kaj komponisto, en Groningen (Nederlando). Dum multaj jaroj li estis fakdelegito por muziko. Bedaŭrinde lia sanstato en la lastaj jaroj malebligis, ke li ion faris por la movado. Konata li estis pro sia komponado de la melodio de „La Vojo”. Ĝi estas la finkanto de la kantato „El la vivo de Zamenhof” por baritono, gea ĥoro, junularĥoro kun akompano de piano kaj orgeno. Bedaŭrinde tiu kantato ekzistas nur en manuskripto. Dum la prezentado en la Nederlanda Esperanta Kongreso en Utrecht oni surbendigis ĝin. La anoj de la Groningena Esperanto-Klubo, kies kunvenojn Molenaar en siaj bonaj jaroj tre fidele vizitis, ĉiam rememoras lin, kiu ĉie, kien li venis, alportis lumon. Li ripozu en paco.

Sekcio Haarlem.

Sekr.: Ruys de Perezlaan 2, Aerdenhout.

En la monato januaro niaj anoj aktive komencis verki artikolojn por la ĝemeliĝo kun la tri urboj Angers, Bridlington kaj Fredericia. S-ro Smit verkis artikolon pri la nederlandaj mueliloj kaj s-ino Landheer faris la samon pri la du pitoreskaj vilaĝoj Giethoorn kaj Staphorst. Mi skribis al la trafikoficejo de ambaŭ lokoj kaj nur Giethoorn respondis per sendo de bela kolorigita faldfolio, kiun mi kunsen-

Helsingör

La 18.-25. de julio okazos la internaciaj feriaj Esp.-kursoj (perfektiga - konversacia - kaj prepara kurso por naturmetodaj instruantoj) en la internacia

Altlernejo en Helsingör

(Danlando), belega loko kun parko kaj ĉe banstrando. Ĉiuj kore bonvenaj. Senpaga prospekto havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

dis kun la letero kaj la artikoloj al la tri urboj jam nomitaj.

La duan kunvenon en januaro ni komencis novan serion pri: „Profesio kaj metio”. Niaj anoj rakontas ion pri sia laboro. S-ro Blokker komencis, rakontante pri siaj diversaj profesioj, kiujn li plenumis en la daŭro de sia vivo.

S-ro Smit rakontis pri: „Renkontoj kun eksterlandaj esperantistoj”.

F-ino Jansma faris prelegon pri la insulo Texel; ŝi ilustris la prelegon per ĉarmaj bildoj de la insulo. S-ino Lantingh verkis artikolon pri la muzikvivo en Nederlando. La artikolon ni sendos denove al niaj eksterlandaj amikoj.

FRISA ESPERANTISTA RONDO.

Leeuwarden.

Sekretariejo: Curaçaostraat 16.

Prof. D-ro J. M. Mabesoone pri Brazilo.

Prof. D-ro J. M. Mabesoone venis je la 23-a de januaro, dum sia „somera” ferio, al Leeuwarden por paroli por la frisaj esperantistoj pri Brazilo, kie li nun jam dum du jaroj estas profesoro de la Geografia Altlernejo kaj Oceanografa Instituto en Recife (Pernambuco, N.-O.-Braz.). En tiu tempo li jam multe vidis de la vasta lando kaj precipe dank’ al siaj rilatoj pere de Esperanto. Li nun estas prezidanto de la Pernambuco-Esperanto-Asocio. Li rakontis, ke la Esperantoklubo en Brazilo havas ĝenerale propran ejon, ekz. etaĝon de nubskrapulo. Sed iliaj bibliotekoj ne estas sufiĉe kontentige provizitaj. La ĉeestantaj F.E.R.-anoj kaj kelkaj gastoj spontanee reagis al tiuj vortoj, donacante monsumeton, per kiu Prof. Mabesoone tuj aĉetis kelkajn Esperanto-librojn por la kluba biblioteko en Recife. Cetere F.E.R. promesis kelkajn duoblaĵojn el propra libroposedo. La brazilaj esperantistoj ne konas regulajn programojn, kiajn la esperantistoj en Nederlando kaj aliaj eŭropaj landoj organizadas, sed ili povas eniri la klubejojn ĉi-vespere por babili, diskuti k.t.p. Prof. Mabesoone jam komencis konduki la sistemon de fiksitaĵo programoj.

Per granda serio da belegaj diapozitivaj ilustris sian paroladon pri Recife, urbo kun 900.000 enloĝantoj, kaj ĉirkaŭaĵo, pri la pejzaĝo de partoj de la grandega lando kaj cetere pri la strukturo kaj arĥitekturo de pluraj urboj, precipe Rio

Nia jubilea kongreso.

Tempo: De la 24-a ĝis la 26-a de septembro 1965-a.

Loko: Internationale school voor wijsbegeerte, Dodeweg 8, Amersfoort, (bij Oud-Leusden).

Kostoj: La vizitontoj pagos entute po f 35,—.

Kion oni ricevos por tiu sumo: Dutagan loĝadon, manĝadon, kafon, teon k.t.p. Ekskurso al Hoge Veluwe. Bela naturo kaj bela arto (Kröller-Müller-muzeo). Distran kaj artan vesperon, prelegojn, agrablan kuneston kun samideanoj en belega ĉirkaŭaĵo. (Tiuj, kiuj ne loĝos en la loĝejo de la lernejo kompreneble pagos pli malmulte). Ĉiu, kiu pagos pli ol f 5,— por la vojaĝo tien kaj reen povos ricevi la plimulton).

La programo: (Iom pli detala ol en la februara numero de N.E.).

Vendredon vespere: Alveno je la 19-a, festparolado kaj agrabla vespero kun distraĵoj.

Sabaton je la 10-a: Prelego de Prof. D-ro G. Hamming pri: Ĉu la estonto estas nia? Je la 11-a ni trinkos kafon kaj poste ni priparolos la temon de la prelego.

Je la 14-a: Ekskurso aŭtobusa al Hoge Veluwe. Akcepto en iu restoracio.

Dum la tagmanĝo gratulojn de eventualaj gastoj.

Je la 20-a: Arta vespero. Teatraĵo de Haga grupo; kantado de Harlema kantgrupo; deklamado de Esperantaj poemoj.

Dimanĉon: Libera antaŭtagmezo por promeni aŭ viziti preĝejon, la urbon Amersfoort, la ĉirkaŭaĵon k.t.p.

Post la lunĉo: prelego de iu eksterlanda Esperantisto.

Je la 16-a: Fermo kaj foriro.

En la aprilo numero ni enmetos aligilon, por ke vi povu anonci vin sufiĉe frue. Rezervu tiun ĉi semajnfino kaj montru intereson por nia Nederlanda Esperanta Asocio!

La komitato.

de Janeiro kaj San Paŭlo.

Dum tre vigla demand- kaj respond-„ludo” Prof. Mabesoone rakontis pri la instruado, ĉefe la supera, pri vivkutimoj, interhomaj rilatoj, socio, kulturo, radio-kaj televido-programoj, lingvo kaj dialektoj k.t.p.

Estis neforgesebla sabatposttagmezo.

Kiel kutime ni verkis ankaŭ pri ĉi tiu prelego raportojn por 3 jurnaloj en Leeuwarden kaj unu en Bolsward.

R. Faber †

En Leeuwarden la 25-an de novembro 1964 mortis en la aĝo de 73 jaroj s-ro R. Faber, pensumita arĥitekto ĉe P.E.B. (Provinciale Electriciteitsbedrijf in Friesland), kiu estis dum multaj jaroj ano de Frisa Esperantista Rondo kaj fakdelegito por arĥitekturo de U.E.A. en Leeuwarden. Li korespondis kun pluraj samfak-

uloj en la tuta mondo.

Sekcio Zaandam.

Sekr.: P. L. Takstraat 64.

Dum nia bonsukcesinta jarkunveno elektigis jena estraro: s-ro Joh. Fortuin kaj s-ino Wester respektive unua kaj dua prezidanto, s-ro J. Vis kaj s-ino Schone respektive unua kaj dua sekretario, s-ro L. Driesten reprezentanto en Zaanlanda Esperanto-Komitato kaj s-ro J. Snel estro de la Libro-Servo. Ni do adiaŭis nian estraron F. Spronk kaj bonvenigis en la sama funkcio s-inon Wester. La estonta monata kunveno okazos lundvespere, la 29-an de marto, je la oka horo en la restoracio „De Harmonie”, Rustenburg 71 C. Ni invitis dum multaj jaroj ano de Frisa Esperantista Rondo kaj fakdelegito post la paŭzo mallongan paroladon en hejma sfero.

ALGEMENE NEDERLANDSE ESPERANTO-EXAMEN-COMMISSIE.

Jaarverslag 1964.

In de samenstelling van de commissie kwam dit jaar geen wijziging.

Voorzitter: de heer H. A. de Hoog.
Secr. esse-penningm.: mej. H. M. Mulder.
Gedelegeerde van de Minister van O., K. en W.: Dr. J. M. van Buytenen.

Het examen werd afgenomen op zaterdag 16 mei, in de Rijks-H.B.S., Amersfoort.

Examinatoren waren: de dames E. Burger-Jezsó, A. C. Obbes en W. M. Smit en de heren F. N. Beemsterboer, J. U. Hommes, J. S. Jansen, F. van de Oudewetering en F. Weeke.

Overzicht:

	Aangemeld	Opgek.	Gesl.
Examen E	23 kand.	21	14
Examen M	12 kand.	12	8
Examen S	4 kand.	4	2

De proef het examen niet meer op de „derde Pinksterdag” te houden, maar op zaterdag vóór Pinksteren, is geslaagd.

Wat de resultaten betreft, kan de commissie vele opmerkingen van vorige jaren herhalen. Ook dit jaar was de gebrekkige woordenkennis opvallend, zelfs bij de S-kandidaten.

Woorden als oerwoud, buffel, neushoorn en bepantsering leverden moeilijkheden op, maar zelfs als men voor dit laatste woord „blendoj” niet kent, en niet op „kiraso” of „štalkiraso” kan komen, moet men toch uit de moeilijkheden kunnen komen met behulp van de woorden „štalo” en „plato”.

Juist op die wijze toont men immers, de mogelijkheden van het Esperanto te kunnen realiseren.

Aan de opleiders voor de diploma's M en S wordt aanbevolen de studie van woordgroepen te stimuleren, zodat verwarrend tussen b.v. „nepo” en „nevo”, „regnas”, „reĝas”; „pulvo”, „polvo”, „pelvo” en „pulvor” wordt voorkomen.

Het aantal kandidaten geeft helaas geen reden tot tevredenheid.

H. A. de Hoog,
voorzitter.

50-A UNIVERSALA KON- GRESO DE ESPERANTO.

Tokio, 31 VII — 7 VIII 1965.

OFICIALA KOMUNIKO.

N-ro 6-a.

Dua Bulteno. La Dua Oficiala Bulteno de la Universala Kongreso estas sendita al la ĝisnunaj aliĝintoj.

En ĝi troviĝas la provizora programo, informoj pri la Loĝiga Servo, Ekskursiva Servo, Postkongreso, Infana Kongreseto, Junulara Kongreso, Belarta, Oratora kaj Foto-Konkursoj, Oomoto-Festivalo kaj ĉiuj koncernaj mendiloj.

La Duan Bultenon ricevas nur la aliĝintoj al la Universala Kongreso.

Infana Kongreseto. Jam estas malfermita la aliĝado al la 10-a Internacia Infana Kongreseto, kiu okazos en la kadro de la 50-a U.K.

Kvankam la limdato por aliĝo estas la 30-a de junio 1965, L.K.K. petas la interesigantojn sin anonci jam antaŭ la 30-a de aprilo.

Detaloj troviĝas en la Dua Bulteno.

G. G. Pompilio,

Konstanta Kongresa Sekretario.

Invito de japanaj kuracistoj.

Okaze de la 50-a Universala Kongreso de Esperanto, ni, japanaj kuracistoj-esperantistoj, deziras interkontakti kun multaj partoprenantoj-kuracistoj, flegistinoj kaj medicinaj teknikistoj.

En la nomoj de „Nova Japana Kuracista Asocio” kaj „Demokrata Medicina Fak-Organizo de Tuta Japanio” mi invitas vin al la kunsido de japanaj kuracistoj (esperantistaj kaj neesperantistaj), kiun ni aranĝos ekster la kadro de la kongresa programo. Ni prizorgos ankaŭ la loĝadon dum la kongreso. Partoprenantoj, kiuj deziras loĝi en hejmo de japana civitano, bonvolu informi nin menciante naciecon, aĝon, sekson, profesion kaj aliajn dezirojn kun kvar respondkuponoj en letero.

Skribu al:

JICURO NAKAMURA,
Chiydacho 39, Nakano-ku
Tokio, Japanio.

TRA LA LIBRARO.

„EL AFRIKO”. Unua libreto en nova serio por infanoj: „LEGU KAJ LERNU”. 11 x 17 cm., 24 paĝ., kartona kovrilo. Prezo: 3 steloj (1/6 p.) plus afranko. Abonantoj al la tutjara serio (6 numeroj) ricevos ankaŭ gazetan aldonon kun demandoj pri la enhavo de la libretoj, anoncetoj, novaĵoj k.t.p. Abono: 6 numeroj afrankite: 21 steloj (10/6 p.). Mendojn kaj abonojn pagu rekte al la redakcio: Derrick P. Faux, Valley Farm House, CHARNDON, near Bicester, Oxon., Anglujo, aŭ al la U.E.A.-Peranto en via lando.

Al Esperanto-instruistoj, kiuj serĉas taŭgan legomaterialon por siaj junaj lernantoj, mi povas rekomendi ĉiu tiun libreton kun interesaj sciindaĵoj pri Afriko. Esperanto kaj geografio tiel plej nature interligiĝas. La ilustraĵoj estas simplaj, sed bonaj.

H. G.

20-ème Congrès International de la Jeunesse Espérantiste 1964, Amsterdam. Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Eld. Stichting 20-ste Internationaal Jeugdcongres (Fondaĵo 20-a Internacia Junularkongreso), Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z. Pays Bas (Nederlando). Ilustrita. 17 x 22,5 cm., 36 pĝ. Sen prezindiko.

Detala franclingva raporto pri la 20-a TEJO-kongreso en Amsterdam, kun multaj tabeloj, i.a. pri aĝoj de la partoprenintoj, pri iliaj profesioj, lingvoj, kiujn ili scipovis k.t.p.

Krome oni trovas en la raporto resumojn pri la prelegoj. Por sociologoj estas interesa la artikolo: „L'espéranto favorise-t-il

La 38-a Kongreso de S.A.T.

okazos en KARLSRUHE, Germanio, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1965.

Adreso de la Organiza Komitato: WILLIE BANDEL, Marienstrasse 88, 75-KARLSRUHE, Germanio.

Kotizo (por ne-membroj de la Asocio): dol. 4,50 (ĝis 31 marto) dol. 5,00 post tiu dato. Infanoj ĝis 15-jaraj ne pagas aliĝkotizon.
Petu aliĝilon (kun detalaj tarifoj ktp.) ĉe la supra adreso.

une attitude internationaliste?” de s-ro M. K. L. de Bruin.

H. G.

„FAKTOJ PRI NEDERLANDO”. Eldono de Ministerio de Eksterlandaj Aferoj. 10,5 x 20 cm. 24 paĝoj. Multaj ilustraĵoj. Senpage havebla ĉe Centra Oficejo de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2.

Unu el la plej bonaj broŝuroj en Esperanto pri Nederlando, ĝis nun aperintaj. La bonega teksto kune kun la fotoj devas konvinki ĉiun eksterlandanon pri tio, ke Nederlando estas ne nur lando de trankvilaj farmistoj, kiuj la tutan tagon promenas sur lignaj ŝuoj inter florkampoj. Ĉiuj aspektoj de la moderna Nederlando: historio, delta plano, popolo, regado, artoj kaj sciencoj, agrikulturo, industrio k.t.p. estas koncize, sed tre taŭge pritrakitaj. Kial oni ne menciis la nomon de la aŭtoro? Mi krome ne komprenas, kial la unuigo „Nederland in de Vreemde” ne mencias ĉi tiun eldonon.

H. G.

„LERNOLIBRO DE MUZILLO” de Prof. H. Paruzel. Form. 29 x 21 cm. Prezo f 5,—. Eld. „Muzilo”, Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.

Antaŭ kelkaj monatoj mi priparolis en ĉi tiu gazeto muzikkajeron eldonitan de Prof. Paruzel en la nova muzikskribo de li ellaborita. Nun mi ricevis lernolibron pri tiu muziknotado. En ĝi estas klarigita per multaj ekzemploj tiu skribsistemo tiel, ke interesatoj povas facile ekkoni la diversajn eblojn de „Muzilo”.

La bonkvalita papero kaj klara preso donas al la libro plaĉan aspekton. Ĝi estu rekomendata al interesatoj.

Dr.

Korespondpetoj.

Reményi Isavel, 18-jara junulo, dez. kor. pri ĉ. t., precipe pri sporto, filmo, geografio. Kol. magazin., fotojn. Adreso: Holdvilág u. 1, BUDAPEST XI, Hungario.

S-ro Karlo Jamrich, MALACKY 21, Ĉeĥoslovakujo, tipografo, 45-jara, edziĝinta, dez. kor. Adreson preslitere komence.

Ned. Esperantisten-Ver. „La Estonto Estas Nia”

Pres.: S-ro H. M. Schippers, Van Humboldtstraat 60, Utrecht.

Sekr.: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z.).

Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Kasistino: F-ino P. Oosthoek, Bree 49 a, Rotterdam-25.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de la unuiĝo.

AANMELDINGSFORMULIER

(Duidelijk invullen, liefst met drukletters)

Inzenden 6 weken vóór het examen, als brief aan de secretaresse-penningm.esse:

H. M. MULDER
Zilvermeeuwstraat 29, Badhoevedorp
Telefoon 0 29 68 - 24 05

De examens voor diploma E, M en S vinden plaats te Amersfoort zaterdag 5 juni 1965.

DE KOSTEN VOOR DEELNEMING ZIJN: Voor examen E f 12,—, voor examen M f 16,—, voor examen S f 20,—

Voor hen, die lid zijn van een der organiserende verenigingen of van NoSoBE respectievelijk f 7,50, f 10,— en f 12,50; voor werkloze leden de helft; kinderen (tot 18 jaar) van leden betalen eveneens de helft.

Kandidaten, die de eerste keer niet slagen, kunnen binnen 1 jaar deelnemen aan een volgend examen, waarbij vrijstelling wordt verkregen voor vakken, waarin minstens een 8 is behaald.

Aanmelding voor het examen E / M / S.

(doorhalen wat niet verlangd wordt)

waarvoor hij/zij het verschuldigde bedrag per postgiro no. 20 61 52 heeft overgemaakt.

1. Naam:
 2. Voornamen:
 3. Adres:
 4. Te:
 5. Beroep:
 6. Datum en jaar van geboorte:
 7. Plaats van geboorte:
 8. Lid van de landelijke Esp.-ver.:
- Bestudeerde literatuur (alleen voor M- en S-kandidaten):

KONCIZE

En la Universitato de Ceará en PORTALEZA (Brazilo) fondiĝis diversaj Esperanto-kursoj. Oni nun intencas fondi tie krome „Esperanto-Centro de Internacia Kulturo”-n kaj por tiu celo petas subtenon el ĉiuj landoj. Sendu librojn kaj aliajn Esperantajn al: Esperanto-Kurso de la Universitato de Ceará, p/a Prof. Paulo Amarin Cardoso, Av. Visconde Cauipe, 2899, FORTALEZA (Ceará), Brazilo.

Okaze de la Internacia Trafika Ekspozicio München 25/6 - 3/10 1965 aperis bele ilustrita Esperantlingva faldfolio.

Laŭ peto havebla ĉe „Internacia Verkehrsausstellung”, Theresienhöhe 13, 8

MUNCHEN 12, Germana Federacia Respubliko, aŭ ĉe Esperanto-Grupo Munkeno, 8 MUNCHEN 13, Agnesstrasse 5/III.

„Sub la Signo de la verda Stelo”.

unu el la plej novaj Esp.-libroj, enhavas rakontojn de 19 diverslandaj samideanoj pri interesajoj el ilia vivo kiel esperantistoj. Pro ĝia sukceso la eldonejo decidis aperigi duan volumon (kun alia titolo) kaj petas materialon de ĉiu, kiu spertis ion interesan per Esperanto. Ĉiu rakonto ne superu 1500 vortojn. Bonvolu sendi vian rakonton antaŭ 1/6 al

Dana Esperanto-Eldonejo,
Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

